

Etnismo

N-ro 101 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 30.06.2018

Nuna evoluo de la kurda kulturo en Turkio ...



Nova venko de naciistoj en korsikaj balotoj ...

La romanĉa lingvo
fariĝis nacia antaŭ 80 jaroj ...

“La lingva kaj kultura plureco estas respondeco
de tuta Eŭropo” ...

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldona letero. p. 3
- Nuna evoluo de la kurda kulturo en Turkio p. 4 – 9
- Nova venko de naciistoj en korsikaj balotoj p. 10 – 12
- La romanĉa lingvo fariĝis nacia antaŭ 80 jaroj p. 13 – 14
- Dulingva Esperanto-Kongreso p. 15
- “La lingva kaj kultura plureco estas respondeco de tuta Eŭropo” p. 16 - 17
- Kurante kune tra Eŭropo p. 18 – 19
- Koncize el ... p. 19 - 20
- IKEL-informilo 80 p. 20.

Foto sur la kovrilpaĝo:

Granda placo en la urbo Dijabikiro/*Amêd* kun la remparoj de la malnova urbo *Sur* en la fundo.

El Vikimedio, 16.03.2016.

Aŭtoro: Vladimir Platonow/Agência Brasil.

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kalendarojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5 €). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la “**IKEL-Informilo**” estas oficialaj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: Alain FAVRE (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
SEKRETARIO: Nikolas XIL CARVALHO (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: Xabier RICO ITURRIOTZ (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio
retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÒS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

DUA REVIZIANTO (eksterkomitata): Nancy Fontannaz

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ “tria-monda” lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian **IKEL**-kotizon ekskluzive al la konto de **IKEL** ĉe UEA (kodo: **ikel-y**), **UNIVERSALA ESPERANTO-** (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- BELGA poŝtĝirkonto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**
- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**
BLZ 370 10050 IBAN:
DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF
- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64** IBAN:
NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21
- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**
IBAN: SE9595000099604200743740,
SWIFT **NDEASESS**
- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku “**ikel-y**” kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la **IKEL**-konto: **IKEL** absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko-aŭ peradkostojn!

Perantoj:

- FRANCIO eblas sendi ĉekojn al Alain Favre. (Poŝtadreso ĉi-supre.)
- NORVEGIO Anne Karin Bondhus <akbondhus@jkn.no>
- KATALUNIO Víctor Solé <v.sole@esperanto.cat>

Eblas reklami en *Etnismo*!

Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6

Venonta redaktolimdato:
30-a de septembro 2018

ELDONISTA LETERO

Lokaj valutoj interesas etnistojn

Paralelaj monunuoj de longe ekzistas, eĉ post la apero de la grandaj ŝtatnacioj, kiuj “reĝece” stampas monon kaj do oficiale garantias ĝiajn uzon kaj valoron, almenaŭ internajn. Povas okazi, ke valuto estas komuna al pluraj, eĉ sufiĉe multaj ŝtatoj, kiel eŭro. Kvankam periode minacata des pli, ke ĝi dependas kaj de la decidoj de centra banko eŭropa kaj fakte de la foje ne kongruaj ekonomiaj elektoj de la unuopaj ŝtatoj – ni ja vidis la problemojn pro la greka krizo kaj nun, multe pli timige, kun la konsekvencoj de la lastaj balotoj en Italio – eŭro devus esti sufiĉa por la en- kaj eksterlandaj interŝanĝoj.

Tamen paralelaj, komplementaj valutoj ekzistas eĉ en Svislando, kie *WIR* – germana vorto signifanta “ni”, sed ankaŭ responda al la unuaj literoj de *Wirtschaft* (“ekonomio” en la germana) kaj eble de *virement* (“ĝiro” en la franca) – estas nun uzata de ĉirkaŭ 60 000 entreprenoj en la tuta lando; la sidejo de la banko *WIR*, kreita en 1934, troviĝas en Bazelo.

En 2010 en Sardinio aperis *Sardex*, same interentreprena monunuo, kiu funkcias elektronike. Ĝi estis kreita dum la sekvoj de la tutmonda krizo de 2008, kiu draste frapis la insulon. Nun 3 500 entreprenoj uzas ĝin, kaj lastjare sepdek milionoj da eŭro-ekvivalentoj estis interŝanĝitaj. *Sardex* estas regata de teamo de administrantoj. Ĝia giganta sukceso kreis ĵaluzojn kaj... procesojn.

Fakte lokaj monunuoj ekzistas nun en multaj regionoj; ili plej ofte estas paperaj. Oni povus demandi sin, kion ili alportas entute al la uzanto kaj al la regiono. Ni simple respondu, ke iliaj cirkvitoj estas mallongaj, ke ili favoras moncirkuladon, ĉar ne destinitaj al ŝparado, ke ili ebligas la kreadon de reto inter la uzantoj, kun pli granda fido ol al la tradiciaj bankistoj. Ili ankaŭ signas la identecon de la regiono, kaj ofte vizitantoj emas uzi tiujn amuzajn biletojn kaj do pli intense partopreni en la interŝanĝoj. Entute tio plivigligas la lokan ekonomion kaj ĉefe etajn entreprenojn.

Uzo de tiaj valutoj en pli etnisma signifo estas do tute logika. Ni konsideru la interesan ekzemplon de *eusko*, valuto de norda Eŭskio, kiu aperis en 2013. Ĝi estis kreita de la senprofita asocio *Euskal Moneta* sub nura formo de monbiletoj, de unu ĝis dudek. Ĉar tiu valuto ekvivalentas al eŭro, oni povas uzi ties monerojn kaze de bezono. *Eusko* povas do iel esti konsiderata “sovaĝa” formo de eŭro, ĝia praktika uzo estas senproblema, sed oni kompreneble devas eviti imitaĵojn, tiom pli ke ĝi bone disvastiĝas tra tuta *Iparralde* (norda Eŭskio). Komence *euskojn* uzis ĉefe unuopuloj, entreprenoj kaj asocioj, sed nun pli kaj pli da publikaj kolektivoj akceptas ilin. Tio ne plaĉis al la prefekto de la franca departemento *Pyrénées-Atlantiques*, sed lastmarte tiu ĉi perdis proceson ĉe administracia tribunalo, kaj la uzo de *eusko* far kolektivoj estas konfirmita – tiel ili rajtas pagi monkompensojn por elektitoj, subvenciojn, liveradojn al publikaj servoj... Oni nun povas perrete malfermi kontojn en eŭskoj ĉe *Euskal Moneta*. Kun 3 000 unuopuloj kaj 700 entreprenoj, kiuj nun havas konton, kaj la ekvivalento de 700 000 eŭroj, kiuj cirkulas, *eusko* estas la unua komplementa valuto de Francio, longe antaŭ aliaj.

Sed kiel ligiĝas tiu sukcesa valuto al la antaŭenigo de etnismaj valoroj? Estas sufiĉe simple kaj espereble efike: la entreprenoj kaj asocioj, kiuj aliĝas al *eusko*, devas uzi aŭ vendi almenaŭ parte lokajn produktojn, bone selekti siajn rubaĵojn kaj uzi la eŭskan lingvon en siaj elmontraĵoj kaj produktaĵoj aŭ pagi kursojn de tiu lingvo al la dungitoj.

Ĉu tiu jam sukcesa – kaj tutcerte promesplena – modelo povus aplikigi al aliaj regionoj? Ja Eŭskio estas aparte vigla, inventema lando – jam antaŭ longe ĝi sukcesis krei la tiel nomatan Urbaran Komunumon Eŭskian (*Communauté d'Agglomération du Pays Basque* en la franca, *Euskal Hirigune Elkargoa* en la eŭska, *Comunautat d'Agglomeracion deu Pais Basco* en la okcitana-gaskona), kiam de pluraj jardekoj la franca registaro sisteme rifuzas krei eŭskian departementon. Oni do bezonas fortan volon kaj ankaŭ juran kompetenton, ĉar plej ofte administracioj provos bankrotigi la projektojn, sed en epoko, kiam mono eble regas pli ol iam ajn antaŭe, ne malutilus doni al ĝi pli buntajn kolorojn kaj pli etikajn efikojn.

Alain Favre

Nuntempa evoluo de la kurda kulturo en Turkio

Ni ĉiuj sekvis en niaj nacilingvaj gazetoj la atakon de la turka armeo kontraŭ la urbo *Efrîn*, nomat ankaŭ a *Kurd Dağ* (monto de kurdoj), kaj esperantigebla per Afrino. Tiu ĉi atako, cinike nomita laŭ la paca simbolo "olivarba branĉeto", komenciĝis la 20an de januaro ĉi-jara kaj finiĝis la 18an de marto per la eniro de la turka armeo en urbon tute malplenan. Kune kun la kurdaĵ eksloĝantoj ni klare povas paroli pri etna purigado. Tamen la internacia komunumo, defendante nur proprajn interesojn, apenaŭ reagis al tiu ĉi kontraŭhomara krimo. Ne pri tio mi parolos ĉi tie sed mi konsilas al vi legi la plurajn tradukojn de *Nikolas Cavallho* sur nia retejo: intervjuojn de diversaj kurdaĵ gravuloj sed ankaŭ artikolon pri la fuĝintoj, la delokigitoj el Afrino (1). Unu el tiuj intervjuoj deklaris, ke ja Turkio ne plu volas, ke ekzistu kurda kulturo. Tion ni povas pli detale vidi tra la suba artikolo, tradukita el *Le Courrier* (2). Ĝin sekvos kelkaj informoj pri turka romano aperinta ĉi-jare kaj novaĵoj pri la kurda gazeto *Azadiya Welat*. Ne novas la fakto, ke la ŝtatoj, sur kies teroj loĝas la kurda popolo, neniam akceptis la kurdan kulturon, kaj ni povas admiri la rezistemon de tiu ĉi popolo. Sed la sama prezidento, *Recep Tayyip Erdoğan*, kiu nun traktas ĉiujn kurdojn kiel teroristojn, antaŭ ne tiom longe redonis al ili politikajn rajtojn. Kaj la kuraĝo montrita de la gemilitistoj kurdaĵ en la sukcesinta forpelo de la islamista ŝtato, povis momente kredigi, ke ili estos dankitaj kajre kompencitaj, sed la malo okazis.

En Diĵarbakiro (*Amêd* en la kurda, Amedo en esperanto), granda urbo en la sudoriento de Turkio, konsiderata de la kurdoj kiel ilia ĉefurbo en Turkio, la registaro de Ankaro malfaciligas ĉiam pli la uzadon de la kurda lingvo. Sed la rezisto pluvivas.

Jérémie Berlioux,
Speciala sendito en Diĵarbakiro.

La kurda kulturo flanken-igita

Diĵarbakiro/*Amêd*. Komence de la lasta marta monato, en la aleoj de la nova Kongres-ejo de Diĵarbakiro, la lokaj aŭtoritatoj de la kurda metropolo, en la sudoriento de Turkio, organizis librosalonojn. Ekstere akvokanonoj kaj militistaj veturiloj gardostaris, dum en la enireja halo dekoj da policistoj kontrolis la sakojn kaj la personojn sub larĝaj portretoj de Ataturko – fondinto de la turka Respubliko, de la nuna prezidento *Recep Tayyip Erdoğan* kaj de *Abdülhamid*, la lasta reginta sultano, al kiu la religiaj novotomanaj turkoj dediĉas veran kulton. Stranga librosalono, kiu prezentis nur religiajn verkojn, historiajn librojn laŭdantajn la turkan nacion, biografiojn de Ataturko aŭ de sultanoj, sed ankaŭ ludojn rekreantajn la nacian liberigan militon (1918-1923). Neniu spuro de libro en



El Vikimedio. Aŭtoroj: Yildiz Yazıcıoğlu, Alparslar Esmer, Hilmi Hacaloğlu.

Ĝeneralaj elektoj en Turkio, junio 2015.

la kurda lingvo. «La organizantoj malpermesis ilin» kaŝe diris librovendisto.

Tiu ĉi naciista kaj konservema turka etoso ne kongruas kun la aspiroj de granda parto de la urba loĝantaro, subtenanta la kurdan vidpunkton. Ekde aŭtuno 2016 Diĵarbakiro ŝajnas esti retroirinta. La registaro maldungis la porkurdajn urbajn delegitojn *Gültan Kisanak* kaj *Firat Anli*, respektive akuzitajn aparteni kaj subteni la Partion Laboristan de Kurdistan (Partiya Karkerên Kurdistan, PKK), kiu

militas kontraŭ Ankaro ekde tri jardekoj. Anstataŭ ili, la aŭtoritatoj nomumis juĝajn administrantojn, komisiitajn por direktadi la urbon ĝis la venontaj municipaj elektoj (printempon 2019). Forgesitas la iniciatoj por revivigi la lingvojn kaj la kulturon kurdajn. Reveno al la turka asimiladiga politiko.

«Perforta bato kontraŭ la infan-vartejon»

«Malbona tempo por nia lingvo» konfidis *Siyajin Seçkin*, eksdungitino de la municipa infanvartejo *Zarokistan* de Diyarbakiro. Kreita en 2015, tiu infanvartejo estis unika loko en Turkio, proponanta kulturajn kaj lingvajn aktivaĵojn en la kurda, kun la klara celo kutimigi la infanojn ekde ilia plej juna aĝo al la uzado kaj kono de sia gepatra lingvo, ĉefa en la regiono. «Ni atingis bonajn rezultojn. La infanoj instigis siajn gepatrojn paroli kurde en la hejmo» memoras *Seçkin*. Bedaŭrinde tuj post sia nomumo, la administranto aŭtoritate reprenis la mastrumadon de la infanvartejo. Tiu ĉi truda bato provokis la foriron de ĉiuj dungitoj. Siaflanke la gepatroj rifuzis tien plu sendi siajn infanojn. «Tiu ĉi infanvartejon ni komplete mem konstruis, ni engaĝiĝis en tiun taskon senkalkule. Tial, kiam ili ŝtelis ĝin al ni tre malfacilis», klarigis *Seçkin*.


«Civitanoj, parolu turke!» Ĝis la eniro en la jarojn 2000, paroli aŭ aŭskulti kurdan muzikon povis konduki al restado en policejo. Ekde la kampanjo «Civitanoj! Parolu turke» de la jaroj 1930-50 ĝis la aresto kaj enkarcerigo de la kurda deputitino *Lejla Zana* en 1994 por kelkaj kurdaj vortoj prononcitaj en



El Vikimedio. Aŭtoro: *Mikael F.*

Kurda alfabeto.

la parlamento, tiu ĉi lingvo ĉiam estis krimigita de Ankaro. Sed la alveno en la Diyarbakiran registaron de la partio porkurda DEHAP (3) en 1999, kaj la gestoj de malfermo de la registaro de *Recep Tayyip Erdoğan*



Mapo adaptita al Esperanto.

Areoi plei multe loĝataj de kurdoj en Turkio, Irako, Sirio kaj Irano.



El <http://hurbakis.net/content/anadilde-egitim-bir-haktir-pazarlik-konusu-vapilamaz>.

Simbolo de la partio Kurdi-Der.

al kurdoj komence de 2000 ebligis spektaklan revivigon de tiu ĉi lingvo. Tiu ĉi renaskiĝo kulminis dum la lasta batalhalto kaj la intertraktoj por paco inter PKK kaj la turka registaro de 2013 ĝis 2015. *Yasir Ararat* tiam tradukis turkajn dokumentojn al la kurda por la urbestro. Li estis maldungita je la alveno de la nova administranto. «Se ili ne estas kontraŭ la kurda, kial maldungi nin? Kial trudi nur unu lingvon?», demandas li. La aktivulo, membro de *Kurdi-Der* (*Kürt Dili Araştırma ve Geliştirme Derneği*), asocio antaŭeniganta la kurdan lingvon (4), estas konvinkinta, ke la ŝtato intensigis sian politikon de asimilado. «Ĝis nun tiu ĉi estis moderigita de la municipa registaro porkurda sed neniam ĉesis. Paroli turke refariĝas deviga ĉie, en la lernejo, en la banko, en la hospitalo, ktp» klarigis li.



El Vidimedia, 23.05.2012. Aŭtoro: Mikael IF.

3a Libra Foiro en Dijarbakiro, 22-27.05.2012. Budo kun kurdlingvaj libroj.

Libroj malpermesitaj

Kurdi-Der (4) estis fermita en 2016 per dekreto pro la urĝostato, kiel centoj da kurdaj organizaĵoj. Pluraj el ĝiaj membroj estas persekutataj pro “terorista propagando”. «Lerni la turkan ne malbonas en si mem. Sed ni devas ĉefe lerni paroli nian propran lingvon», klarigis *Yasir Ararat*.

Vidpunkto ne kundividita de la justico de Dijarbakiro. Fine de februaro la prokuroro de la urbo postulis sep jarojn da karcero kontraŭ dudek studentoj pro akuzo de “terorista propagando”. Ilia kulpo: fajfi kurdan kanzonon dum la festoj de *Newroz* (festo de la printempo, ŝajne esperantigita al Naŭruzo aŭ Noruzo N. de tr.) en 2017. Ankaŭ la kurdajn eldonejojn trafas la subpremo. *Aram*, fondita en 1997, estis celo de polica atako la 15an de februaro. Je la 4a matene la kontraŭterorista polico perforte eniris kaj prenis tri komputilojn, la arkivojn, la malmolajn diskojn kaj ĉirkaŭ 11 000 ekzemplerojn de 89 libroj. Ĉiuj verkoj pri demokratia konfederalismo, pri karcero de Dijarbakiro aŭ memoraĵoj de geriloj estas malpermesitaj, posedi tiujn ĉi librojn ne malpermesatas en si mem, nur ilia diskonigo estas leĝe malpermesita, ĝustigis *Ulas Guldiken*, unu el la eldonistoj de *Aram*.

La ŝtato daŭrigas la premon

«La ŝtato ne rekte fermis la entreprenon, ĉar ĝi scias, ke ni malfermus alian domon», klarigis *Ulas Guldiken*. La aŭtoritatoj ne faras pli ol daŭrigi la premon. *Aram* vidis siajn vendojn kaj gajnojn fandiĝi. En 2015 la eldonejo publikigis

kvar aŭ kvin librojn ĉiu-monate. Nun ĝi publikigas nur po unu. En 2017, por tuta Turkio nur 171 verkoj estis presitaj en la kurda. Kontraŭ 250 en 2014. «La librovendejoj nenion plu mendas, ili timas», klarigis *Guldiken*, kiu tamen ne malesperas. Malgraŭ tio, la defendantoj de la kurda lingvo, nun ne plu sentas sin viktimoj. «Ni restas diskretaj, sed ni estas pli fortaj, danke al tiuj ĉi malfacilaĵoj», klarigis *Yasir Ararat*, kiu malfermis ka-



El Vikimedia, 27.10.2010. Aŭtoro: MikaelF.

Dulingva strata panelo turka/kurda proksime de Diĵarbakiro/Amedo.

fejon por vivteni sin. Kun siaj kolegoj li kreis novan establon por instrui la kurdan: la Asocion de Mezopotamio. Ili donas kursojn ĉe organizaĵoj, kiel ĉe sindikatoj de la instruistoj (maldekstra), la ĉambro de arkitektoj kaj inĝenieroj, sed ankaŭ en kafejoj kaj ĉe privatuloj.

Sinsekva malmunto de statuoj en la sud-oriento de Turkio

Subpremo. Kiam, la 18an de marto, la turka armeo reprenis la kontrolon de la urbo *Afrin* en la siria Kurdio, ĝi ne preterpasis la okazon “buĉi”, la tagon mem, la statuon de *Kawa* la forĝisto, mita figuro de la kurda naciismo (5). La urboj, majoritate kurdaj, de la sud-oriento de Turkio ĵus travivis la samon. Kiam la turka ŝtato reprenis ilin, en 2016, post pli ol 15 jaroj da kurda administrado, la statuoj, freskoj, memortabuloj kaj stratnomoj estis sisteme malmuntitaj aŭ detruitaj. Neniuj simboloj krom tiuj de turka naciismo rajtis resti je la rigardo de la pasantoj. Tiel en *Dogubayazit*, piede de la Monto Ararato en ekstrema parto de la lando, la kurda urbestro starigis statuon de *Ahmadi Khani*, verkisto de la 17a jarcento, la unua intelektulo, kiu vortumis la ideon de moderna kurda ŝtato. Kaj la 27an de junio 2017, ĝia statuo sin retrovis tere. «Konstrueja akcidento» asertis la administranto de la urbo, nomumita de Ankaro. Same en *Dicle Kent*, periferia kvartalo de Diĵarbakiro, kie tronis, ĝis antaŭ mallonge, la monumento de *Roboboski*. La skulptaĵo, instalita en 2013, prezentas misilojn pinte enfiksitaĵojn en la soklon, premante, laŭ terura maniero, virinon, kiu levas la brakojn al la ĉielo. Ĝi estis starigita memore al bombado far turkaj avidiloj en 2011 proksime al vilaĝo samnoma je la landlimo iraka-turka. La frapo mortigis 34 personojn. Ŝakristojn, asertis la registaro. Civilulojn, rebatas la loĝantoj. La statuo estis deprenita la 8an de januaro 2017, kun la soklo. Restas neniuj spuro de la memoro pri la plej sanga murdo de

la milito, kiu kontraŭmetis la Kurdan Laboristan Partion (PKK) al la turka ŝtato. Por memorigo, tiu ĉi konflikto mortigis pli ol 45 000 personojn.

En ĉiuj urboj de la sud-oriento, la municipestroj, regataj de la Demokrata Partio de la Regionoj (turke: *Demokratik Bölgeler Partisi* DBP, maldekstra centro), provis proponi kontraŭmodelon plurkulturan, baziĝantan sur interpopola harmonio. Ne eltenebla provoko por la dogmo de la turka Respubliko: unu turka nacio, unu religio sunaisma, unu lingvo turka. En *Sur*, historia centro de Diĵarbakiro, la estro de la distrikto starigis monumenton memore al la armena genocido de 1915 (1,2 miliono da mortintoj). Genocido, kiun la registaro plu vigle neas kaj kiu restas tabua en

Turkio. La monumento malaperis post la eventoj de la vintro 2015-2016, kiam batalantoj de PKK kaj kvartalaj junuloj deklaris la aŭtonomion de *Sur*. Alfrontiĝoj sekvis dum pluraj monatoj kun la turka armeo en tiu ĉi reto de mallarĝaj stratetoj. Post “elpurigo” de ties kurdaj batalantoj, la ŝtato detruis ĝisgrunde tutajn partojn de *Sur*. 6 000 konstruaĵoj estis tiel neniigitaj. Municipa konsilanto kaj urbestro de *Sur* ĝis 2016, *Naski Sayar* sopiris: «Disvolvante kaj valorigante *Sur*, mi volis krei ponton inter kulturoj kaj religioj. Ĉio tio, tiu jarcentdaŭra memoraĵo malaperis hodiaŭ. Ili faros el niaj urboj turkajn urbojn kiel la aliaj.»


JBX

Elfrancis: *Nicole Margot*

Notoj de la tradukanto:

1. <etnismo.org/novajhoj>
2. Svisa gazeto en la franca: lecourrier.ch. La tradukita artikolo aperis la 10an de aprilo 2018.
3. *Demokratik Halk Partisi* (DEHAP), Partio Demokratia de la Popolo (hodiaŭ Partio por Paco kaj Demokratio, turke: *Barış ve Demokrasi Partisi* BDP).
4. *Kürt Dili Araştırma ve Geliştirme Derneği* (Kurdi-der): Esplorado kaj progresiva asocio pri la kurda lingvo. <http://hurbakis.net/tags/kurdi-der>. AKP: *Adalet ve Kalkınma Partisi* en la turka, Partio de Justico kaj Evoluo, registara partio de la prezidento *Recep Tayyip Erdogan*.
5. *Kawa* la forĝisto estas mita heroo de la antikva imperioj de la Medoj kaj Persoj, kiu gvidis popolan ribelon de la irananoj kontraŭ terura reĝo *Zahhak* (*Dhaka*). Lia vivo estas rakontita en la epopea poemo de la 10a jc titolita *Shâh Nâme* (*Ŝahnameo*) verkita de la poeto Ferdoŭsio. Tiu heroo estis poste adoptita inter alie de la kurdoj, same kiel la festo de la printempo Noruzo.

Dialogo sub la remparoj ⁽¹⁾



Oya Baydar estas turka verkistino 77jara, eksaktivulo marksisma, ĵurnalisto kaj verkisto. Komence de tiu ĉi jaro ŝi aperigis romanon, tradukitan al la franca kun la titolo: “Dialogo sub la remparoj”. Temas pri interparolo inter turka kaj kurda virinoj ĉe la remparoj de la antikva urbo *Sur* en Diĵarbakiro. Tiu ĉi dialogo okazis fine de decembro 2015, kiam la turka armeo ĝin bombadis, pro deklaro de *PKK* pri aŭtonomio de *Sur* (vidu supran artikolon). Tiam la turka virino venis al la remparoj de *Sur* kun centoj da turkaj intelektuloj por montri solidarecon kun la kurda

popolo bombita de la turka armeo. Temas pri resumo de la realaj interŝanĝoj kuraĝaj, kiujn la aŭtorino havis kun siaj kurdaĵoj. En tiu ĉi romano ŝi starigas demandojn, pri kio ligas kaj dividas ilin, esencajn demandojn pri praveco de uzo de perforto, pri solidareco, pri engaĝiĝemo, pri la turka nacia sento, pri kulpeco, pri senpoveco. «Oni sentis sin kulpa, oni volus etendi manon al ili, diri, ke ni estas kun ili. Sed la homoj akceptas nin kaj esperas, dum ni mem, ke ni povas fari nenion.» En marto 2016 la ribelo estis sange subpremita, kaj *Oya Baydar* revenis al Diĵarbakiro, kies malnova urbo *Sur* estis neniigita. Malgraŭ sia bonvolo, la du virinoj trafis obstaklon al interkompreniĝo, kiam la turka virino respondecigos *PKK* pri la vivperdoj ĉe civiluloj. Plej gravas en la romano ilia komuna deziro pri interkompreno, pri kreo de ligoj, deklaras la aŭtorino. *Oya Baydar* plu okupas pacigan pozicion, eĉ se paco ne realigeblas. Ŝajnas, ke ŝiaj kurdaĵoj ŝanĝis opinion pri la temo, tiom teruraj estis la okazaĵoj. **NM**

El artikolo de *Anne Pitteloud*, aperinta en *Le Courrier*, la 9an de majo 2018.

(1) Mi trovis informojn nur pri la franca traduko: “*Dialogues sous les remparts*” tradukita de *Valérie Gay-Aksoy*, Parizo, Eldonejo *Phébus*, kolekto “*Littérature étrangère*”, 2018, 155 p. (ISBN 978-2-7529-1146-9)

Urtzi Urkizu



Ree kaj ree silentigita

De post sia naskiĝo en 1992, multfoje malpermesis la Turka registaro la kurdan ĵurnalon *Azadiya Welat*. Tamen, oni daŭrigas sian laboron favore al la pluvivado de la kurda lingvo.

“**L**a Libereco de la Popolo”. Tion signifas en la kurda *Azadiya Welat*, ĵurnalo publikigata de 1992 – kvankam, pro sekvestrado, la eldonantoj devis bapti ĝin diversamane. Ĉar ĝi suferis amason da sekvestroj flanke de la turka registaro, la gazeto laboris je limigita libereco. Tamen, por alfronti la subpremadon oni ofte bezonas “imagpovon”, kiel memorigas *Çetin Altun*, redaktoro de la ĵurnalo: «La 29-an de aprilo, pro premo de la registaro, la presejoj de Turkio decidis ne presi la ĵurnalon. La presejoj ĝin ne presis, sed la ĵurnalon ni

fotokopiis kaj disdonis al la legantoj». Dum la lastaj du jaroj, la kurdaĵoj amaskomunikiloj ofte uzis fotokopimaŝinojn, por povi diskonigi artikolojn al la legantaro de loko al loko.

La turka registaro abunde fermis kurdajn amaskomunikilojn dum la lastaj tri jardekoj: ĵurnalojn, novajagentejojn, gazetojn, radistaciojn kaj televidojn; aŭtune de 2016, la registaro fermis dek televidstaciojn – inter ili la unua televido en la kurda por infanoj—. Obstaklon post obstaklo, *Çetin* substrekiis, la ĵurnalo daŭrigos subtenante la kurdan lingvon, «konsiderante

ke dum ekzistos la lingvo, la trudpremo de la ŝtato daŭros.»

La subteno de la abonantaro

Azadiya Welat trairis malfacilan vojon de kiam oni ekpublikigis ĝin en Istambulo. En ties nasko la kontribuo de kurdaj intelektuloj kaj verkistoj estis "fundamenta", kiel rimarkigis *Çetin*. «Ĉiusemajne ni eldonis ĝin sub la nomo *Welat*, ĝis la turka registaro fermis ĝin en 1994. Tiam, ni nomis ĝin *Welatê Me*, kaj tiun oni fermis en 1996. En tiu jaro ĝi estis baptita *Azadiya Welat*.» En la jaro 2003 oni translokigis ties sidejon al Amedo, en Kurdio. Dum ĉiuj ĉi jaroj, la komunikilo oni publikigis ĉiusemajne; «en 2006 ni komencis eldoni ĝin ĉiutage». Turkio denove fermis la gazeton en 2016 kaj 2017.

Laŭ sciigo de *Çetin*, la ĉefa subteno de la ĵurnalo estas la abonantoj kaj la reklamoj: «Kutime, ni eldonas inter 8000 kaj 10000 ekzemplerojn kaj el tiuj 6000 estas por abonantoj.» Liaopinio, multaj homoj interesiĝas pri la kurda lingvo. Plejmulto el la legantaro estas studentoj kaj komercistoj. Ankaŭ, laŭ *Çetin*, en la malliberejoj la disvastigo de la gazeto estas granda: «La turka registaro malpermesis la eniron de la gazeto en la prizonojn. Sed la kurdaj prizonuloj sukcesas legi la ĵurnalon. Eĉ pli, multaj enkarcerigitoj utiligas *Azadiya Welat* por lerni la lingvon.»

Rilate reklamadon, estas gravaj datoj en la kurda kalendaro: Noruzo, Novjaro, la 8-a de marto, la 1-a de majo, Ramadano kaj la Granda Bajramo (1).

La rolon de la ĵurnalo en la disvastigo de la lingvo oni ne povas forgesi, opinias *Çetin*: «La ĵurnalo naskiĝis kun du ĉefaj celoj: unue, subteni la daŭrigon de la lingvo, konsiderante, ke oni devis alfronti kruelan detrupolitikon kaj, due, respondi al la rajto de la civitanoj ricevi verajn informojn en ties gepatra lingvo.»

La rilato kun la legantaro ankaŭ estas "speciale" grava, opinias la gazeta redaktoro. «La legantoj faras sia la ĵurnalon. Kiam ni aperigas preseraron, oni tuj vokas nin telefone. Alifoje, oni vokas por komenti, ke oni ne komprenas la signifon de iu vorto, kaj kelkfoje oni telefonas por aldoni mankantan informon al iu novaĵo.» Ankaŭ leteroj al la direktoro estas publikigataj.

Çetin mem agnoskis, ke li pliprofundigis siajn konojn de la kurda lingvo danke al la ĵurnalo. «Krome, *Azadiya Welat* allogis multajn kurdajn verkistojn, poetojn kaj ĵurnalistojn. Kaj ili kaj ni ne rigardas la projekton kiel nuran ĵurnalon, sed kiel lernejon por tiuj personoj, al kiuj oni neis la rajton je klerigado.»

Rigardante en la estontecon, la kurdaj ĵurnaloj entuziasme daŭre laboras. «Turkio volas ekstermi la kurdan lingvon. Sed ni daŭre batalados.» **UU**

La artikolo aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 13-an de majo 2018-.

Tradukis el la eŭska *Nikolas Xil Carvalho*

Notoj:

(1) Ankaŭ nomata Festo de la Buĉofero.



Azadiya Welat

Agiro: Em li te Newroz

Agiro, disa tu rûyê Mazlûm nişanî me dadi, di dîlê te de çûnska destên wî, li nav zindana faşizma rûni... Pê bi pê bi bak vedikî tu, li her bajar û çiya, li her gundî. Agiro, tu çî Mazlûm î. Çavên te yîn reş bêhna şevîn zilma reş diçûnîn. Xwe li me bipêçe, ha ji te re; ev çiyân û beden a te ye...

MIZOÏN RONAK 3

ROJA NÛ PÎROZ BE!



Îro destpêka biharê, destpêka pêvajoya azadî û şoreşê ye. Gelê kurd bi rojan e li hemberî zilma AKP'ê daketiye qadan û agirê Newrozê geş dike. Dê îro li Amedê û seranserê Kurdistanê agir ji her demê zêdetir geş bibe



ROJA PIRSÎNA HESAB E

Dewleta AKP'ê û qesra Erdogan li hemberî kurdan serêkî qisî dane destpêkirin û bînavber sivilan qetîl dikin. Gelê Kurdistanê bi dirîşma 'Rêbertiya Azad, Kurdistan Xweser, Tirkîyeya Demokratîk' Newrozê pîroz dike. Dê îro bi mîlyonan kes dakevin qadan û hesabê komkujiyên Sîlopi, Sûr, Cizir û Geverê ji faşizma AKP'ê bipirsin.

Nova venko de naciistoj en korsikaj balotoj

Historia sukceso

La 4an de decembro matene, iu ĵurnalistino ĉe franca ŝtata radio anoncis kiel novaĵtitolon: «75 % el la korsikanoj NE voĉdonis por naciistoj». Kion povas kompreni aŭskultantoj el tia negativa aserto? Tute certe ne la ĉefan rezulton de la unua balotago, kiu tiam finiĝis: 45 % de la voĉdonantoj elektis la naciisman liston *Pè a Corsica* (Por Korsiko), kiu estis la unua laŭrezulte. Ja apenaŭ 52 % de la elektantaro partoprenis sed, krom la kutimantoj pri tio, la tre malbona bildo de la francaj partioj en la insulo tion facile klarigas. Unu semajnon poste, la 10an de decembro, post dua balotago la rezultoj estis senapelaciaj: per pli ol 56 % de la voĉoj la listo *Pè a Corsica* ricevis 41 seĝojn el la 63 de la teritoria asembleo. Aliaj listoj kun seĝoj estas *La voie de l'avenir / A strada di l'avvene* (la vojo al estonto, regionisma dekstro, 10 lokoj), *Les Républicains / Comité central bonapartiste* (la Respublikanoj – klasika dekstro - kaj centra komitato bonapartista, 6 lokoj) kaj *La république en marche* (antaŭeniranta respubliko, partio de la prezidento *Emmanuel Macron*, 6 lokoj).



Por la prezidenta partio, kiu atendis multe pli altan rezulton, tio jam estis forta bato sed iĝis vera katastrofo por la francaj naciistoj ekstremdekstraj (*Front National*) kaj ankaŭ por la maldekstruloj de *France insoumise* (malobeanta Francio), kiuj faris liston kun komunistoj: ambaŭ ne havis eĉ ne unu elektiton.

Iuj decidis tutsimple ne eniri la batalon: temas pri la tre modera partio de la maldekstraj radikaluloj. Dum jardekoj ili superregis en la politika vivo de Korsiko. Sed *Émile Zuccarelli*, longe urbestro de *Bastia*, perdis tiun postenon kontraŭ la aŭtonomisto *Gilles Simeoni* en 2014 kaj *Paul Giacobbi*, plurfoje deputito kaj prezidanto de la ekzekutivo de Korsiko inter 2010 kaj 2015, estis peze kondamnita januare de 2017 (li apelaciis kaj plejofte politikuloj finfine evitas enkarceriĝon kaj fortajn monpunojn en Francio). Tiuj radikaluloj estis precipe klanaj ĉefoj ege koruptitaj,



El Vikimedio. Aŭtoro: Superbenjamin. Esperantigita.

kiuj disponis vastan “klientaron” bone “akvumitan”, iom kiel dum la fora romia periodo. La radikaluloj do ne aplombis prezenti liston en tiu lasta balotado, kaj iliaj tradiciaj socialistaj alianculoj fakte ne plu ekzistas.

Sed ne tiom surpriza venko

Tial en malmultaj jaroj la politika pejzaĝo komplete ŝanĝiĝis en Korsiko. Post la signalo de la municipaj balotoj de 2014, tio vere komenciĝis per la teritoriaj elektoj de 2015. Post bonaj rezultoj dum la unua balotago, la du listoj *Femu a Corsica* (Ni faru Korsikon, aŭtonomisma, estrata de *Gilles Simeoni*) kaj *Corsica libera* (Libera Korsiko, sendependisma, estrata de *Jean-Guy Talamoni*) kuniĝis por la dua balotago kaj atingis 35% de la voĉoj. Temis pri la venkinta listo, sed kun nur relativa plimulto. Tamen *Gilles Simeoni* iĝis prezidanto de la ekzekutivo kaj *Jean-Guy Talamoni* estris la teritorian asembleon.

Kio kondukis al tiu unuafoja sukceso de la naciistoj (en Korsiko oni tiel nomas kaj aŭtonomistojn – kiuj deziras plej multe da kompetentoj kadre de la franca respubliko – kaj sendependistojn)? La klasikaj partioj francaj ja perdis grandan parton de sia fidindeco (kaj ne nur en Korsiko!), la korsika identeco



plu ekzistas sed estas malestimata de la Pariza potenco kaj, ne laste, en 2014 la klandestinaj armitaj aktivuloj precipe de *Front de Libération Nationale Corse* (Korsika Fronto por Nacia Liberigo) decidis ĉesigi sian agadon.

La nova asembleo decidis, ke Korsiko iĝos ununura teritorio: ne plu regiono kun du departementoj (kreitaj por vekti kontraŭstarojn inter la nordo kun *Bastia* kaj la sudo kun *Ajaccio* kaj estigi pliajn postenojn ĉefe por politikaj klanistoj). Post diskutoj kun la franca registaro oni decidis, ke tio okazos la unuan de januaro 2018. Kompreneble estos nova asembleo, do denove okazos teritoriaj balotoj, fine de 2017.

Intertempe la prezidentaj balotoj en Francio okupis la mensojn. Post sia elekto en majo 2017, *Emmanuel Macron* dissolvis la nacian asembleon kaj lia partio facile ricevis plimulton. Sed ne en Korsiko: el la kvar deputitoj, tri estas naciistoj (membroj de *Pè a Corsica*) kaj la kvara estas dekstrulo de *Les Républicains*.

Kaj post tiu nova, decembra venko – pli ĝuste triumfo – oni povas supozi, ke la rilatoj estos malfacilaj inter la nunaj korsikaj aŭtoritatoj – akirante pli grandan legitimecon *Simeoni* kaj *Talamoni* kompreneble konservis siajn postenojn – kaj la centra registaro de Francio.

Serioza programo kontraŭ malseriozaj amaskomunikiloj

Malsurprize multaj francaj ĵurnalistoj kaj ĉefartikolistoj kvazaŭ “kondamnis” tiun elekton, laŭ ili tiom kontraŭan al la respublika idealo, parolante pri fermiteco, eĉ rasismo, manko de solidareco kun la cetero de la nacio (eĉ se Korsiko, malriĉa regiono, ricevas pli ol ĝi kontribuas kaj, aldone, subvencioj tro ofte iris en la poŝoj de politikistoj membrantaj en “normalaj” francaj partioj). Iuj aludis al la terura kataluna situacio dirante, ke io profunde rompiĝis en Eŭropo – se tio veras, la kaŭzoj estas tute aliaj. Pli strange la lingva demando, kiun ni traktos poste, ŝajne obsedas multajn el tiuj altnivelaj pensuloj.

Pli serioze ni provu rapide vidi, kiuj defioj atendas la novajn asembleon kaj ekzekutivon de Korsiko.

- Sukcesi ekonomian disvolvon kun respekto al la medio. Jam en 2015 la asembleo adoptis ambician planon (PADDUC), kiu respondu al la bezonoj de la insulanoj. Oni devas daŭrigi en tiu direkto kaj atingi plej rapide konkretaĵojn.

- Garantii restadon al korsikanoj, kiuj ofte malfacile povas konservi siajn familiajn bienojn (ekzemple tra heredo) pro la tre altaj prezoj. Korsiko estas ja belega turismejo kaj restadejo, multaj riĉuloj el Francio, Eŭropo kaj aliloke deziras aĉeti terenon kaj konstrui vilaon, foje eĉ en protektataj, nesurkonstrueblaj lokoj kaj sukcesas per rilatoj kaj ŝmirmono, dum lokanoj sentas sin forĵetitaj kaj eĉ diskriminaciataj.

- Valorigi la korsikan kulturon, precipe tra la lingvo (latinida kaj parenca al la itala, kun parolaj kaj skribaj variantoj). Tiu lingvo estas nun normale instruata en ĉiuj lernejoj, eĉ se ofte tre limige. Pro tio naciistoj petas kunoficialecon de la franca kaj de la korsika sur la tuta insula teritorio. Ĝis nun la franca registaro vigle kontraŭstaras tiun peton. Eble la usonangla pli proksimas al kunoficialeco (almenaŭ) en Parizo ol la korsika en Korsiko.

- Konservi bonajn, konstruajn rilatojn inter la du komponantoj de la naciistoj. Ĉar la membroj de



<https://www.flickr.com/photos/leecohen/215754485/> Aŭtoro: leecohen.

Eksgrandhotelo Continental kaj nuna sidejo de la Teritoria Kolektivo de Korsiko en Ajaccio.

Corsica libera anoncis, ke ili volas sendependon jam post dek jaroj. Tio riskas krei gravan konflikton, tutcerte ekspluatotan de aliaj partioj. Ĝis nun la rilatoj estas tre bonaj: sukceso ja proksimiĝas kaj en tiaj kondiĉoj diskutoj... malfacile fariĝas disputoj.

Jen do grandaj defioj. Ne plu temas pri tag-al-tag-a mastrumado, kaj aldone ĉasado de novaj klientoj, falsado de balotaj listoj kaj devojigo de subvencioj, kiuj tradiciaj partioj kutimis fari. Ankaŭ la plej “duraj” naciismaj partioj foje ne hezitis kompromitiĝi kun armitaj grupoj, kiuj devigis lokajn entreprenojn kaj komercojn al pago de “nacia imposto” - pli simpatiaj estis tiuj grupoj, kiam ili eksplodigis malplenajn vilaojn konstruitajn senpermeso (sed senprobleme). Nun estas vera politika projekto. Ĉu la naciistoj povas



El Vikimedia. Asocio de la korsikaj eldonistoj. Aŭtoro: *ActualLitté*.

Libra Foire, Parizo 2015

sukcesi? Jam geografie estas malfacile: la insulo vere estas montaro abrupte elmara, kiel oni bone vidas el aviadilo. Nur oriente, apud *Aleria*, ekzistas vera, tre kultivata ebenaĵo – kaj, antaŭ jardekoj, la subvencioj donacitaj al “repatriigitoj” el Alĝerio, sed ne al lokaj kultivistoj, startigis la nacian konflikton. Korsiko estas ja belega, sed ankaŭ aparte (bonaparte?) “malfacila” insulo.

La sukceso de korsikaj naciistoj esta grava por la aliaj movadoj, kulturaj kaj politikaj, kiuj provas agadi por konservi identecojn – kaj krei pli lokan kaj sanan ekonomion – en aliaj regionoj de Francio. Kaj lastatempe tiuj luktoj fariĝis multe pli malfacilaj. Sur la politika tereno, la kreo de grandaj administraciaj regionoj marĝenigis interalie la alzacanojn, eŭskojn, flandrojn, katalunojn kaj savoĵanojn (vidu la artikolon «Teritoria reformo en Francio» de *Daniel Houguet*, *Etnismo* n. 97). Kun iom da priprensado povus ekzisti manieroj elturniĝi, sed politikistoj, plej multe *macron*-igitaj, deziras montri sian apertecon, turni sin al la mondo, fakte la mondo de “transnaciaj” kompanioj, kiuj bezonas kiel eble plej unuecigitajn merkatojn, ne uzante tro da diversaj lingvoj kaj ne trovante kulturajn obstaklojn sur sia vojo. Ke ekonomio dependu ankaŭ de loka entreprenemo, kono de la tereno, de oportunaj investoj, tio ne aparte gravas en jakobena respubliko, kie Jupitero (kromnomo de la prezidento) ĉion vidas kaj decidas el sia agla situo, helpe de senspertaj, bone manipulitaj parlamentanoj, plejparte stultigita opozicio kaj kongruaj amaskomunikiloj. Konklude la matenaj kri(a)ĉoj de respubliksavanta ĵurnalistino almenaŭ montras, ke ne ĉio glatas en tiu strategio, ke rezisto povas ankoraŭ ekzisti.

Atenditaj malfacilaĵoj

Ĉi tiu teksto estis verkita por la duobla numero 99-100 de *Etnismo* sed ne aperis pro manko de loko. Kion diri pri la evoluo de Korsiko ses monatojn poste?

Unue: la naciistoj estas bonaj mastrumantoj kaj faras la maksimumon por apliki sian programon, interalie la daŭrigon de PADDUC, kiu estis eĉ plifortikigita post proceso ĉe administracia tribunalo. La funkciaj elspezoj iomete malpliiĝis, la enspezoj kaj ŝparoj pliiĝis, la pruntoj estas pli malaltaj. Entute la

korsikanoj havas bonan opinion pri siaj novaj asembleo kaj ekzekutivo. Aldone la rilatoj plu estas tre bonaj inter la du regantaj partioj.

Due: la obstakloj restas aparte gravaj. Iuj venas de la ŝtata registaro, kiu rifuzas veran aŭtonomian statuton kaj interalie la kunoficialecon de la korsika lingvo apud la franca. Devus esti aparta mencio de Korsiko en la baldaŭ reviziota franca konstitucio, sed tio finfine ne signifas multon – kiel ekzemple signifas nenion la mencio de la tiel nomataj regionaj lingvoj. Sed aliaj malfacilaĵoj venas de Korsiko mem. La du departementoj ja ne plu ekzistas, sed ambaŭ lasis ŝuldojn, ĉu pro tro da klientismaj dungoj, ĉu pro “toksaj” pruntoj – ekzemple indeksitaj je svisa franko. Tio limigas la investkapablon de la nova asembleo. Kaj Korsiko aparte bezonas investojn...

Konklude, la sukceso de la novelektitoj venos de la popola subteno, ĉefe rilate la tre jakobenan registaron de la ĉefministro *Philippe* plene apogata en tio de la prezidento *Macron*. Sed Korsiko ne pezas multon, kun 330 000 loĝantoj kaj malforta ekonomio. Tamen entute lokaj kolektivoj en Francio ege suferas kaj pro manko da financoj – kaptitaj de la centra ŝtato – kaj pro perdo de kompetentoj, kiuj pli kaj pli troviĝas en la manoj de prefektoj kaj administracioj, kaj tio okazas je ĉiuj niveloj. Multaj politikistoj tion jam ne eltenas. Sed kontraŭagado postulas tutan politikan reorganizon: la klasikaj partioj ne plu scipovas konvinki la voĉdonantojn, kiuj trodite riskas turni sin al radikalaj movadoj, plejofte kontraŭeŭropaj kaj izoligemaj. Al tiu plurflanke danĝera drivado aldone kondukas ĝenerala politiko, kiu ŝajne profitas al nur eta, jam tre riĉa malplimulto, kiu plejofte vivas for de la teritorioj, aŭ eĉ for de Francio mem. Kvankam la insulo havas apartajn karakterizojn kaj problemojn, la batalo de korsikanoj povos ankaŭ fariĝi la batalo de aliregionanoj se, en la diversaj teritorioj, same kapablaj politikistoj scipovos kunigi kaj konkretigi la atendojn de plej multaj loĝantoj. *AF*



El Vikimedia, 06.07.2018. Aŭtoro: *Schorle*.

La korsika grupo pri tradicia polifonia muziko: *L'Alba*.

La romanĉa lingvo fariĝis nacia antaŭ 80 jaroj

La 20an de februaro 1938, preskaŭ 92% de la tutsvisa voĉdonantaro akceptis la agnoskon de la romanĉa kiel kvara nacia lingvo. En tiuj malfacilaj tempoj, kiam landlime de Svislando triumfis faŝismo kaj naziismo, tiu rekono de la grizona lingvo montris ne nur, ke tiu ĉi ekzistas sed ankaŭ, ke ĝi estas aparta lingvo kaj ne “lombarda dialekto”, kiel asertis *Mussolini* kun la celoj aneksi Grizonon (same kiel, fakte, kaj sub diversaj pretekstoj, li volis aneksi Savojon, Nicon, Korsikon, Tunizion, Albanion...).

nivelo. Tio eblis, ĉar intertempe, en 1982, aperis la normlingvo *Rumantsch Grischun* (prononcu rumanĉ’ griĵun’), pretigita de la zurika lingvisto *Heinrich Schmid* (1923-1999) laŭ peto de *Lia Rumantscha*. Verdire jam ekzistis provoj (jam komence de la dekaŭa jarcento!) fabriki komunan lingvon, sed ili neniam alvenis al praktika uzo.

La normlingva formo de la lingvo ebligas al unuopuloj komuniki kun la federaciaj instancoj ; oni ja malfacile povas imagi, ke ĉiuj variantoj estu oficialaj. Ankaŭ en Grizono mem ĝi havas utilon: en multaj



El Vikimedia, aŭgusto 2010. Aŭtoro: *Adrian Michael*.

Panelo sur la centra sidejo de la Romanĉa Ligo en la urbeto Savognin.

Ĉu la romanĉoj mem de longe batalis por tiu agnosko? Jes ja: en 1919 kreiĝis *Lia Rumantscha* (Romanĉa Ligo) por kunordigi la laboron de jam ekzistantaj asocioj kaj interalie eldoni vortarojn kaj aliajn librojn. Kaj la memkonscio de la romanĉoj estas multe pli frua. Ekzemple, jam ĉirkaŭ 1820, la romanĉe devena *Joseph Planta*, kiu tiutempe ludis gravan rolon en *British Museum*, advokatis en Londono por la romanĉa en sciencaj rondoj. La lingvaj studoj, kiuj floris laŭlonge de la dekaŭa jarcento, bone evidentigis la trajtojn de tiu latinida lingvo, de longe skribita sed... laŭ kvin formoj, foje sufiĉe malsamaj, kvankam pli malpli interkompreneblaj.

La agnosko de 1938 malfermis la pordon al federacia subteno al la kantono Grizono, trilingva (germana, itala, romanĉa) sed en la realo kun pluraj formoj de la germana, uzo de diversaj lombardaj dialektoj kaj kompreneble variantoj de la romanĉa. Entute sufiĉe malfacila situacio. Sed oni povis interalie pli bone organizi instruadon de la romanĉa kaj favori ties ĉeeston en amaskomunikiloj.

Plia oficiala paŝo okazis multajn jarojn poste, precize la 10an de marto 1996, kiam la svisa popolo (ĉi-foje kompleta, tio estas kun virinoj) akceptis la romanĉan kiel oficialan lingvon je federacia (tutlanda)

urboj germanlingvaj kaj ĉefe en la ĉefurbo Koiro vivas romanĉoj el diversaj devenoj, kiuj per la normlingvo povas ricevi edukadon en la romanĉa. Malgraŭ sufiĉe forta kontraŭstaro de homoj, kiuj volas konsideri nur sian lokan varianton, *Rumantsch Grischun* disvastiĝas skribe kaj ankaŭ parole.

Kvankam pro tia subteno ĝia uzo fariĝis pli prestiĝa, la romanĉa lingvo restas aparte minacata:

- La nombro de parolantoj estas malalta: apenaŭ 60 000 en tuta Svislando, eble malpli ol 35 000 en Grizono mem. Ĝi ne atingas 1 % de la svisa loĝantaro.

- La lingvo estas nur svisa, tio signifas, ke ĝi ne havas parolan komunumon, kiu povus ĝin subteni el eksterlando – male al la ital- kaj franclingvanoj de Svislando, kiuj povas ĝui la faktan (eĉ ne laŭvolan) apogon de milionoj da parolantoj trans la landlimo.

- Eĉ en la tradicia romanĉa teritorio la urboj estas fakte germanlingvaj; la municipoj, kiuj elektas la instrulingvojn, tro emas neglekti la romanĉan, eĉ kiam ĝi restas sufiĉe parolata surloke. Aldone la emo al kunfandiĝo de municipoj riskas endanĝerigi la instruadon de tiu lingvo en periferiaj vilaĝoj, al kiuj cetere alvenas pli kaj pli da neromanĉparolantoj.

- Ĝuste la romanĉa estas kampara lingvo, kaj la grizonaj montaroj tendencas senpopoliĝi; tio klarigas

la gravecon de la diaspora romanĉa komunumo, kiu reprezentas pli ol trionon de la parolantaro. Kaj ĝi rapide perdas la lingvon, malfacile studeblan ekster Grizono (kaj foje eĉ ene de Grizono).

Tiu lasta fenomeno aparte maltrankviligas *Lia Romuntscha*, kiu petas pli da subteno por la lingvo, kiu iel fariĝu tutsvisa kaj povu esti studata en pluraj lokoj, ricevi pli da spaco en amaskomunikiloj...

Sed jam en Grizono la sola taggazeto tute en la romanĉa, *la Quotidiana*, travivas gravajn malfacilaĵojn kaj eble baldaŭ malaperos. La emo ĉion privatigi minacas ankaŭ televid- kaj radioprogramojn, kiuj ne havas sufiĉe grandan publikon por interesi investistojn kaj reklamistojn (1). Tamen, antaŭ kvindek jaroj, oni emis prognozi la baldaŭan malaperon de la lingvo kaj nun tiu ĉi plu uzatas, la perdo de parolantoj ne estas tiom katastrofa kaj almenaŭ ekzistas forta memkonscio interalie ĉe junuloj. Bonaj retaj rimedoj povos faciligi studadon kaj informadon pri ĝi entute, nemalmultaj alemanlingvanoj en Grizono mem interesiĝas pri lingvo, kiu ofte estis iam parolata en la familio: kial ne "relerni" la romanĉan, kiu estas grava parto de la propraj grizonaj radikoj? Eble oni malpli vidos scenojn, kiel tiun raportitan en *la Quotidiana* pri virino, kiu mendas alemane en viandvendejo de mezgranda grizona urbo kaj samtempe insultas sian miskonduktan hundon romanĉe.

Finfine oni rajtas aserti, ke ne la romanĉa estas la cindrulina lingvo de Svislando: tiu titolo pli bone taŭgus al ofte forgesita parenco, la arpitana/francprovenca, parolata en la okcidenta parto de la lando (sed longe ambaŭ lingvoj estis en rekta kontakto, almenaŭ ĝis la alemana "invado" en Alpoj), kiu apenaŭ ricevas lokan subtenon - ekzemple en Valezo -



El la kolekto, kaj fotita de Pierre-André Michaud.

Telfera bileto en la romanĉa kaj itallingva bileto de la Reta Fervojo en 1958 (2).

kaj tute ne je federacia nivelo. Efektive la ĝisnunaj klopodoj tiusencaj ricevis neniun pozitivan rezulton.
AF

Notoj de la redakto:

(1) Komence de la jaro la svisa popolo rifuzis, per 70% de la voĉoj, civitanan iniciativon, kiu proponis la nuligon de la takso por radio kaj televido necesigante privatigon de tiuj du komunikiloj. Tiu ĉi iniciativo, se ĝi estus akceptita, certe endanĝerigus la lingvan solidarecon rilate al la romanĉa, al la itala, eĉ al la franca.

(2) Grizona kantono trilingvas: romanĉa, germana, itala.



(Foto Keystone)

Ĉu la standardo *Rumantsch Grischun* superregos la kvin historiajn variantojn kaj povos kontribui al la pluvivo de la lingvo?

Bill Chapman

Dulingva Esperanto-Kongreso ⁽¹⁾

La apudmara kimra urbo *Aberystwyth* en Kimrio gastigis la 99-an Britan kaj 3-an Tutkeltan Esperanto-kongreson de la 13-a ĝis la 17-a de aprilo 2018. Ne estis kotizo por alilandaj vizitantoj. Ĉeestis 69 homoj, ne nur britaj, kaj ne nur keltaj. Partoprenis deko da bretonoj.

La organizantoj celis prezenti la kimran kulturon kaj aparte la kimran lingvon al la ĉeestantoj. La kanta kvaropo *Bois y Fro* prezentis koncerton uzante la lingvon de la gastiganta lando. La kongreso malfermiĝis oficiale per kelkaj vortoj de invitataj gastoj, loka parlamentano *Ben Lake* kaj vicurbestro *Talat Chaudhry*. Ambaŭ alparolis la partoprenantojn nur en la kimra, kun tradukado al Esperanto.

Profesoro *Paul Birt* (fakulo pri keltaj lingvoj kaj vizitanta profesoro ĉe la Universitato de Otavo, Kanado) prelegis dufoje en Esperanto dum la kongreso. Unue li taksis la demandon, ĉu plano de la kimra registaro krei milionon da kimralingvanoj antaŭ 2050 estas fantazio aŭ ebla. Due li prezentis superrigardon pri la revivigo de la kornvala lingvo, demandante ĝis kia grado tiu reviviĝo sukcesis.

Du prelegoj okazis en la kimra lingvo kun interpretado esperanten. La loka aŭtoro kaj ĵurnalisto *Mike Parker* prezentis Kimrion kaj ĝian historion pere de la kimra kun interpretado en Esperanton. *Heledd Gwyndaf*, Prezidanto de *Cymdeithas yr Iaith*, la Societo por la Kimra Lingvo, parolis pasie pri la historio, celoj kaj agado de la Societo. Ŝi faris sian prelegon kompreneble en la kimra, kun interpretado en Esperanton.

Jean-Claude Dubois el Bretonio kaj veterano de ĉiuj ĝisnunaj tutkeltaj kongresoj, havigis al ni memorojn de vojaĝo al lando longe for, nome Koreio. *Harry Barron* prelegis pri keltaj legendoj.

Amikumu estas relative nova saĝtelefona apo, kiu provizas solvon al la tradicia problemo, ke malfacilas trovi apudajn esperantistojn. Disponblas ĝia interfacio en la angla kaj en Esperanto, kaj alproksimiĝas versio en la kimra. *Dee McCarney* kontribuas al ĝi kaj dividis siajn scion kaj spertojn.

Ed Robertson prelegis pri la misteraj piktoj, iama tribo en Skotlando, kun klarigoj pri epigrafoj.

Unu vesperon *Francis Soghomonian* el Parizo prezentis



Parlamentano (por la partio *Plaid Cymru*) *Ben Lake*, *Bill Chapman*, vicurbestro de *Aberystwyth* *Talat Chaudhry* kaj *Dee McCarney* post la oficiala malfermo.

kantojn el pluraj landoj, dum *Fransoazo* el Bretonio ludigis interaktivan kvizon pri popolmuziko. La duan vesperon ĉeestantoj prezentis siajn proprajn muzikajn kaj distrajn talentojn, kaj *Fransoazo* dancigis la sidemulojn instruante bretonajn dancojn. Oni ne sciis antaŭ tiu vespero, ke ni havas inter ni kompetentan ventroparolistinon, nome *Elizabeth Stanley*.

Okazis intervjuo pri la kongreso en la kimralingva radio-servo *BBC Radio Cymru*. **BC**

Noto:

- (1) Tiu ĉi artikolo aperis ankaŭ en la junia numero de la revuo Esperanto.



Kelta kaj Esperanta flagoj kune dum pluva ekskurso per vaporlokomotivo.


“LA LINGVA KAJ KULTURA PLURECO ESTAS RESPONDECO DE TUTA EŬROPO” (1)

Loránt Vincze opinias, ke Eŭropo devas fari ĉion, kion ĝi povas, por protekti la minorigitajn lingvojn. «La ŝtatoj devus kundividi kun EU siajn kompetentojn».

- La projekto de FUEN (2) *Minority SafePack* atingis sian celon: ĝi kolektis 1 215 879 subskribojn por ke Eŭropo protektu la minorigitajn lingvojn. Laŭ klarigo de *Loránt Vincze* (*Târgu Mureș* (3), Rumanio, 1977), prezidento de FUEN, ĉiuj antaŭdoidoj estis superitaj.

- La unuan celon de la projekto vi atingis: pli ol milionon da subskriboj vi kolektis. Ĉu vi ĝojas pro la rezulto?

- Ĝenerale la kampanjo *Minority SafePack* estis sukcesa, kaj ni opinias, ke ĝi estis granda venko de la aŭtoktonaj minoritatoj, la porlingvaj grupoj kaj ĉiuj nacioj sen ŝtato de Eŭropo. Unuafoje ni ĉiuj agis kune, kaj ni opinias, ke estis historia momento. Mi dirus, tamen, ke la plej grava atingo ne estis la kvanto de subskriboj, sed la organizo de movado por la rajtoj de la minoritatoj de Eŭropo. Spite al la multaj malfacilaĵoj, la kampanjo ricevis subtenon de kelkaj fortaj komunumoj: eŭskoj, katalunoj, litovaj poloj, bulgariaj turkoj, inter aliaj. Firme mi asertas, ke la subteno de eŭskoj kaj katalunoj estis ŝlosila por la kampanjo; speciale mi dankas.



**MINORITY
SAFEPAK
INITIATIVE**

YOU ARE NOT ALONE. ONE MILLION
SIGNATURES FOR DIVERSITY IN EUROPE

Iniciativo *SafePack* por la minoritatoj.

Vi ne solas, unu miliono da subskriboj por la diverseco en Eŭropo.

- Nun vi prezentos la peton al la Eŭropa Komisiono. Ĉu vi opinias, ke ĝi prikonsideros la proponojn?



FUEN

FEDERAL UNION OF EUROPEAN NATIONALITIES

FÖDERALISTISCHE UNION EUROPÄISCHER NATIONALITÄTEN

ФЕДЕРАЛИСТСКИЙ СОЮЗ ЕВРОПЕЙСКИХ НАЦИОНАЛЬНЫХ МЕНЬШИНСТВ
UNION FÉDÉRALISTE DES COMMUNAUTÉS ETHNIQUES EUROPÉENNES

- Eŭropo devas aŭskulti nian voĉon, kaj la komisiono devas prikonsideri niajn petojn. Ni konscias, ke la procezo estos longa kaj malfacila, sed ni pretas tion alfronti. Ni havas konkretajn leĝproponojn por prikonsidero. De tiom da jaroj la Eŭropa Komisiono rifuzis kiun ajn demandon aŭ proponon rilate la minoritat-rajtojn, sub la ekskuzo, ke tio ne estis ĝia kampo de kompetentoj. Nun, la EU-civitanoj opinias, ke tiun sintenon oni devas ŝanĝi. La eŭropaj valoroj kaj ties lingva kaj kultura plureco estas respondeco de tuta Eŭropo.

- Inter la proponoj estas la starigo de Centro de la Lingva Plureco. Ĉu la protekto de la minorigitaj lingvoj estas nun en la eŭropa agendo?

- La minorigitaj lingvoj estas tute marĝenigitaj en la Eŭropa Unio. Tamen gravas substreki, kiom da membro-ŝtatoj tion faras, kvankam la EU ne havas programon por protekti la minorigitajn lingvojn. Sed ne ĉiuj ŝtatoj faras siajn hejmtaskojn, kaj tio estas problemo. Ni opinias, ke la minorigitaj lingvoj gravas por la eŭropa kultura heredaĵo kaj ke Eŭropo devus fari ĉion eblan por protekti ilin. Ankaŭ la minorigitaj lingvoj kaj kulturoj, same kiel la oficialaj, devus eniri kaj en la programon kaj en la politikojn de la Eŭropa Unio.

- Kiun rolon devas havi la EU-membroj kaj kiun la Komisiono?

- Nun, la protekto de la minoritatoj estas kompetento de la ŝtatoj. Ekzistas ŝtatoj, kiuj kreis konvenan kadron por protekto de tiuj minoritatoj, kaj kiuj traktas la anojn de tiuj minoritatoj same kiel la ceterajn civitanojn. Tiuj ŝtatoj atingis riĉecon kaj prosperon, kaj ankaŭ la lojalecon de tiuj minoritatoj. Italio, Belgio, Danio, Suomio kaj Germanio estas ekzemploj pri tio. Sed kiam, anstataŭ agi por pace kunvivi oni subpremas la minoritatojn, konfliktoj po-

vas estiĝi. Tiujn situaciojn oni devas eviti, kaj kiu povas helpi en tiaj okazoj se ne EU? La ŝtatoj devus kundividi kun EU sian kompetenton rilate la protektadon de minoritatoj.

- **Tamen, la loka realo estas malsama. Kiel establi kriteriojn, kiuj estu akcepteblaj por ĉiuj realoj? En kio helpus konkrete la leĝprotekto?**

- Ne ĉiuj aferoj samas, kaj ni devas alfronti malsamajn problemojn: por iuj la lingvaj rajtoj estas niaj plej gravaj proponoj; sed por aliaj temas pri la instruado, la alireblo al la amaskomunikiloj, kiuj laboros per minorigitaj lingvoj aŭ garantii la protekton de la regionoj, kiuj prenos en konsideron la etnajn kaj lingvajn apartaĵojn. Malgraŭ tio, ŝajnas al mi, ke inter niaj proponoj ekzistas unu, kiu estas grava por ĉiuj anoj de la minoritataj komunumoj. Ni volas establi por Eŭropo kelkajn minimumajn punktojn kaj certigi, ke la konsentitaj rajtoj ne estos forprenitaj.

- **Tamen, rajtoj kaj kriterioj jam estas precizigitaj en diversaj internaciaj dokumentoj. Ĉu mankas rimedoj por ilin ŝirmi?**

La Kadra Konvencio por la Protekto de la Naciaj Malplimultoj de la Eŭropa Komisiono kaj la Eŭropa Ĉarto pri la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj estas du bonegaj iloj, kiujn ni posedas nun por ŝirmo de la minoritataj komunumoj. Oni povus argumenti, ke ili sufiĉas, sed bedaŭrinde ne estas tiel. Kvankam ili estas validaj iloj, oni devas ilin revizii kaj ĝisdatigi. La plej grava problemo, tamen, estas la punmanko. Kvankam oni starigis juran kadron, ofte oni ne aplikas ĝin en iuj ŝtatoj, kiel okazis en mia lando, Rumanio. Ĉiamaniere, oni bezonas pli da iloj.

- **Vi petas al la Eŭropa Komisiono realigi esploron pri la aldona valoro, kiun la minoritatoj donas al la socio kaj al Eŭropo. Ĉu estas pli kaj pli**

granda la influo de la grandaj lingvoj je la minorigitaj?

- Estas multaj esplrendaj aferoj: ekzemple, la asimiliĝ-nivelo de iuj komunumoj aŭ la defalo de la parolantaro de minorigitaj lingvoj. Sed ankaŭ estas aferoj pli kompleksaj: ekzemple, al kiom da kulturaj produktaĵoj socie kontribuas la minoritataj komunumoj. En Eŭskio vi estas pioniroj en la kalkulo pri la ekonomia kontribuo de la lingvo. Oni same devus enketi en aliaj teritorioj, ĉar ĝi estas bona praktiko. Plejmulto el la ĉefaj kulturoj havas fortan pozicion en la socio. La asimilado estas neevitebla, kiam la malplimultoj ne disponas proprajn instituciojn, rimedojn aŭ vidmanierojn. Pli evidente estas en la ŝtatoj, kiuj stimulas la asimiladon: plej klara ekzemplo estas Francio. Tiun procezon ni devas ŝanĝi.

- **Se la popola leĝodona iniciato ne prosperos, kiun daŭron havos la movado?**

- Ni teksis reton de diversaj asocioj, grupoj, personoj kaj komunumoj. Estontece ni povos disvolvi kaj elkonstrui tiun ĉi reton, kaj ne nur cele al popolaj iniciatoj sed rilate iun ajn aferon pri la rajtoj de la minoritatoj. Tiu ĉi projekto sendis klaran mesaĝon al ĉiuj eŭropaj minoritatoj: «Vi ne solas». Anstataŭ atendi, kion respondos la majoritatoj, ni aliris la aferon kaj mi certas, ke ĝin ni enmetos en la agendon de Eŭropo.

AB

Tradukis el la eŭska: *Nikolas Xill Carvalho.*

Notoj:

- (1) La artikolo originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 12-an de aprilo 2018.
- (2) Federalista Unuiĝo de Eŭropaj Nacimalplimultoj.
- (3) Hungare: *Marosvásárhely.*



Kurante kune tra Eŭropo ⁽¹⁾



“*Tippi-ttapa, ttipi-ttapa, Korrika!*” (2). Ĉiun duan jaron aŭdiĝas tiu proklamo tra la stratoj de Eŭskio kaj oni povas diri, ke ĝi estas io, kion la homoj havas en sia korpo. Sed ne nur eŭske, ankaŭ katalune, galege, kimre, bretone, okcitane, gaele aŭ alsace ripetigis tiuj krioj. Aŭ similaj. Ĉiuj en la loka lingvo kaj ankaŭ ĉiuj kun la celo proklami estontecon por tiuj minorigitaj lingvoj. Ĉar tra Eŭropo oni aranĝas kelkajn aliajn *Korrika*. La 4-an de majo ekis la lasta el tiuj en Bretonio, kaj la pasintan sabaton finiĝis la *Redadeg*-kurado.

Krome, pasis dek jaroj, de kiam oni komencis organizi tiun kuradon favore al la bretona kaj, profitante la datrevenon, oni organizis seminarion pri la diversaj kuradoj, kiujn oni organizas en Eŭropo favore al minorigitaj lingvoj. Estis kunvenontaj en Kempero (3) membroj de naŭ kuradoj, sed fine nur el sep alvenis, kaj inter ili subskribis interkonsenton. Tiel naskiĝis la reto *Eurokorrika*. “Temas pri bonintenco interkonsento”, klarigis *Asier Amondo*, *Korrika*-kunordiganto. “Ni kuniĝis por unuigi sinergiojn, kaj laŭ tio ni vidos, kiuj devas esti la proklamoj de la minorigitaj lingvoj kaj kien ni devas direkti ilin; sed ni devos serĉi komunan sferon, ni volas direkti nin al la Eŭropa Parlamento aŭ aliaj institucioj, por ke la minorigitaj lingvoj estu akceptataj en la EU-teritorio”.

Por tio, en la interkonsento, kiun subskribis la

interkonsento partoprenis organizantoj de la kuradoj el Eŭskio, Katalunio, Bearnio, Bretonio, Kimrio, Ebro kaj Elsaco.

En Eŭskio oni organizis unuafoje kuradon favore al lingvo: *Korrika*. Post ĝi venis multaj en tuta Eŭropo: en la Valo de Arano favore al la arana (4), *Corsa Aran per sa Lengua*; en Katalunio, *Corellengua*; en Galegio, *Correlengua*; en Kimrio, *Ras yr laith*; en Ebro por la gaela, *Rith*; en Bretonio, *Ar Redadeg*; kaj en Bearnio favore al la okcitana, *La Passem*, kiun oni festos unuafoje ĉi-jare.

Partoprenanta modelo

La kuradoj favore al minorigitaj lingvoj havas propran modelon. “Ŝajnas al mi, ke temas pri dinamisma modelo, finfine, partopreniga modelo; ne nur estas festo kaj proklamo, oni ĝin adaptas de loko al loko, kaj tio bezonas la laboron de multaj homoj”, asertis Amondo. Ĝuste pro tio, ĉar estas adaptado de loko al loko, tiaj kuradoj naskas gajecon kaj ĝojon: “Tiun ĝojon ni devas flamigi, montri, ke paroli la eŭskan aŭ iun ajn minorigitan lingvon estas trezoro, kaj ke ni devas bontenadi tiun trezoron”.

Finiĝis *Ar Redadeg* kaj la *Korrika*-respondeculo estis tie kune kun membroj de *AEK* (5) por montri sian subtenon al la bretona kurado. Rigardante al Eŭskio, malpli kaj malpli mankas, por ke *Korrika* trairu la vojojn de la sep provincoj, kaj inter la loĝantaro disvastiĝu ĝojo kaj gajo. «Kiam ni estis en Bretonio la organizantoj nervozis, sed tie ni estis trankvilaj, ĉar la taŭro estis je la alia flanko; sed por ni baldaŭ estos la temp', kaj ni ankaŭ deziras renversi Eŭskion dum dek tagoj.»

LMG

Tradukis el la eŭska *Nikolas Xill Carvalho*.

Notoj:

(1) La artikolo originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 19-an de majo 2018.

(2) *Beñen, nest beñen, kuratela*, en la eŭska. Ĉi estas sep kuradoj, oni faras referencojn al diversaj deklaroj: Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Eŭropa Konvencio por la Protekto de la Homaj Rajtoj kaj la Fundamentaj Liberecoj kaj la protokolo, kiun ili subskribis en Donostio en 2016 inter aliaj. “Fine, la intenco estas kunigi tiujn, kiuj vivas en minorigitaj lingvoj, kaj se por multaj nia *Korrika* estas modelo, ni ŝatus, ke ĝi estu tio por aliaj lingvoj.” Tio estas, la reto *Eurokorrika* helpus aranĝi novajn projektojn. En la

noto ĉantata dum la daŭro de tiu ĉi kurado favore al la eŭska lingvo. Ĝi fariĝis emblema por tiu ĉi aranĝo.

(3) *Kemper*, en la bretona. *Quimper*, en la franca.

(4) La arana estas variaĵo de la gaskona, dialekto de la okcitana lingvo, parolata nur en la Valo de Arano, parto de Okcitanio sub la hispana ŝtato.

(5) *Alfabetatze eta Euskalduntze Koordinakundea* (Kunordigasocio por Eŭskigo kaj Alfabetigo). Estas la asocio, kiu organizas la *Korrika* ĉiun duan jaron.

Eŭropa reto de kuradoj
Por lingvojdeklaracio de kempere
Ĉarto de la kuradoj por eŭropaj minorigitaj lingvoj

Korrika (Eŭska) Eŭskio
Correlingua (Galega) Galegio
Correllengua (Kataluna) Katalunio
Corsa Aran per sa Lengua
 (Okcitana) Valo de Arano

La Passem (Okcitana) Bearnio
Ar Redadeg (Bretona) Bretonio
Ras yr Iaith (Kimra) Kimrio
Rith (Gaela) Eŭrio
Sprochrenner (Elsaca) Elsaco

La reprezentantoj de la kurado por eŭropaj minorigitaj lingvoj

konsideras ke

- la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948) protektas ĉiujn homajn rajtojn sen diferencigi inter lingvoj,
- la Eŭropa Konvencio por la Protekto de la Homaj Rajtoj kaj la Fundamentaj Liberecoj (1950) ankaŭ protektas la homajn rajtojn sen diferencigi inter lingvoj,
- Eŭropa Unio, kies moto estas "Unuiĝintaj en diverseco", baziĝas sur la respekto je la homa digno, libereco, demokratio, egaleco kaj la homaj rajtoj, inklude de la rajtoj de la personoj apartenantaj al minoritato, kaj:
- surbaze de tio oni aprobis en Barcelono la Universalan Deklaracion de la Lingvaj Rajtoj (1996),
- la Protokolo por la Protekto de la Lingvaj Rajtoj estis subskribita la 17an de decembro de 2016 en Donostio (Eŭskio) fare de eŭropaj sociaj organizaĵoj,

aplaŭdas

- la laboron plenumitan de la civitana socio, apartenanta al la komunumoj de eŭropaj minorigitaj lingvoj, por transdoni siajn lingvojn al la estontaj generacioj ĉiam konsiderante la elteneblan homan kaj socian disvolvon,
- la naskiĝon de Korrika en 1980, stafet-kurado kuniganta la sociajn organizaĵojn, kiuj volas vivi per la eŭska lingvo, kaj la ĝian konsideron kiel modelon fare de aliaj minorigitaj lingvokomunumoj de Eŭropo

La reprezentantoj de la kuradoj por eŭropaj minorigitaj lingvoj,

invitas

- ĉiujn minorigitajn lingvokomunumojn de Eŭropo alproprigi tiun iniciaton por proklami la plurecon kaj riĉecon de ties lingvoj kiel valoregan parton de la homa heredaĵo, samnivele kun la ceteraj lingvoj de la mondo, kaj kiel ilojn por disvolvo kaj atestantoj de la signifo, kiun kunportas la identecplureco

esprimas

- sian komunan volon daŭre kunlabori kaj organizi agadojn surbaze de la uzado de siaj lingvoj pere de sia eŭropa reto, kaj, pli for de siaj landlimoj, konstrui demokratan kaj solidaran Eŭropon de la popoloj, kulturoj kaj lingvoj,

decidas

- starigi reton por intersanĝi spertojn, plifortigi rilatojn, impulsi agadojn, kunhelpi en novaj projektoj kaj komune organizi popolajn iniciatojn por valorigi siajn lingvojn en la socia, kultura kaj ekonomia sferoj.

Kempere, la 18-an de majo de 2018.

KONCIZE EL ...

Nov-Kaledonio – La dato de la memdetermina referendumo estas finfine konata. La 4an de novembro 2018 la loĝantoj de la ĝis nun franca insularo de Pacifiko respondos al la jena demando: «Ĉu vi deziras, ke Nov-Kaledonio aliru plenan suverenecon kaj iĝu sendependa?». Tiu iom redunda formulo estis elektita post longa debato inter la du flankoj; oni ankaŭ decidis eviti rektan mencion de Francio. Laŭ la ĝisnunaj opinisondadoj plej multaj voĉdonantoj respondos nee al la demando, sed oni timas la reagojn de iuj sendependistoj des pli, ke la ŝtataj aŭtoritatoj, inter kiuj la prezidento *Macron* dum ĵusa vizito, tute ne respektis la promesitan neŭtralecon rilate la elekteblojn de la insulanoj. AF

Eŭskio – ETA komplete dissolviĝis. Post pluraj jaroj de batalhalto kaj forlaso de armiloj sub kontrolo de porpacaj eminentuloj, la eŭska organizo deklaris la 2an de majo, ke ĝi metas finan punkton al historio, kiu komenciĝis la 31an de julio 1959, sub la diktatoreca reĝimo de *Francisco Franco*. Kompreneble tio ne haltigas la justicajn agojn kontraŭ ĝiaj membroj kaj eĉ ne mildigos la situacion de politikaj malliberuloj. Tamen entute faciligos la agado de la partioj *abertzale* (patriotaj). Oni ja povas supozi, ke la hispanaj aŭtoritatoj ne aparte aprezis tiun gravan paŝon, ĉar verŝajne ne plu pezos risko de perforto en la eŭska politiko, en kiu la emoj al suvereneco povos pli libere esprimiĝi. AF

Turkio – Grup Yorum enkarcerigita. Tiu tre populara muzika grupo, kiu kreigis en la 1980aj jaroj defende al demokratio kaj diverseco de la lando – ili kantas ankaŭ en la kurda kaj la araba – travivis gravajn malfacilaĵojn ekde la fiaskinta ŝtatrenverso de julio 2016. Polico tre ofte vizitis la ekzercejon de la grupo en Istambulo, haltigante la laboron kaj rompante muzikilojn. La membroj estis arestitaj unu post la alia kaj ili nun ĉiuj troviĝas en karceroj. La arestoj de la unuaj ne malkuraĝigis la aliajn, kiuj plu ludis de sur tegmentoj kaj kamionetoj. *Grup Yorum* fariĝis simbolo de la rezisto kontraŭ la diktaturo de *Erdoğan* kaj aŭskulti iliajn diskojn (interalie la duoblan albumon *Ille kavga* – “necesa lukto” – aperinta lastaŭtune, kiam plej multaj el tiuj muzikistoj jam estis en karceroj) povas esti konsiderata pruvo de terorisma ribelemo. *AF*

Brazilo – Kanada entrepreno planas konstrui gigantan orminejon meze de Amazonio. *Belo Sun Mining Corp.*, bazita en Toronto, decidis konstrui la plej grandan ĉielapertan orminejon de Brazilo, en la ŝtato *Pará*, borde de rivero *Xingu*; en 12 jaroj ĝi devus produkti 600 tunojn. Sen paroli pri la ekologiaj konsekvencoj, 300 farmistaj familioj devus esti translokitaj, sed nenio estas antaŭvidita por ili. Aldone almenaŭ kvar indiĝenaj teritorioj estas koncernataj; ili estas loĝataj interalie de indianoj *Juruna*, *Arana* kaj *Xicrin*. Sed tiuj komunumoj ne estis konsultitaj. Normale, kiam projekto tuŝas indiĝenajn teritoriojn, diskutoj kaj permesoj devas okazi je federacia nivelo. Pluraj apelacioj jam estis lanĉitaj por nuligi tiun projekton, kiu ŝajne ne estas aparte subtenata je federacia nivelo. Sed ni ne forgesu, ke Brazilo estas eksterordinare koruptita lando, ĝis la pinto de la federacia registaro. *AF*

Malio – Prezidenta balotado sub malfavoraj aŭspicioj. Tri jarojn post la alĝeraj interkonsentoj subskribitaj inter la malia registaro kaj *MNLA* (*Movado Nacia por Liberigo de Azawad*, kiu kunigas diversajn tuaregajn kaj arabajn armitajn grupojn celantajn la sendependigon de la dezerta nordo de la lando), la situacio ne tiom pliboniĝis. Atencoj kaj atakoj plu okazas kaj ne nur en la norda parto, novaj armitaj grupoj aperas, sen klaraj ligoj kun la klasikaj kaj konataj ribeluloj. Tamen la registaro decidis konservi la daton de julio 2018 por la prezidenta balotado. Ŝajnas, ke la balotlistoj ne vere pretas (estas pli ol sep milionoj da voĉdonantoj) kaj multaj lokoj tute ne estas sekuraj. Tial oni riskas ricevi nur partajn rezultojn, kio ne signifas progreson por demokratio. Sed ĝuste grava trajto de demokratio estas respekto de la voĉdondatoj... Jen nesolvebla problemo, kiel entute ŝajnas nesolvebla la situacio en multaj partoj de la sahela regiono, kaj ne nur en Malio. *AF*

Katalunio – Peixos (Fiŝoj) estas la unua televidserio farita en la kataluna gesto-lingvo; ĝi estas ret-serio de

ĉapitroj longaj je naŭ aŭ dek minutoj, trovebla en *Youtube*, jam fininta sian unuan sezonon kaj gajninta en 2017 la Premion pri Antaŭenigo de la Kataluna Gesto-lingvo. La ret-serio montras la karakterizaĵojn de la surdula komunumo, ĝiajn kutimojn kaj ĝian lingvon per humuro kaj rakonto pri amo kaj mistero. Ĝi estas subtekstita en la kataluna, la hispana, la angla kaj, danke al nia asocio *Josep Maria Milla*, ankaŭ en Esperanto. La produktado de *Peixos* necesigis veran sperton de kunlaborado kaj malapartismo, ĉar ĝin kreis miksa teamo de surduloj kaj aŭdantoj. *Peixos* estas projekto de *Cercle d'Artistes Sords Units* (Rondo de Unuigitaj Surdaj Artistoj) aŭ ASU, asocio de surduloj fondita en Barcelono en 1977, sin dediĉanta al kreado de aŭdvidaĵoj en la kataluna gesto-lingvo, kaj estas farita sen ia monhelpo publika aŭ privata.

El esperanto.cat

Peruo – Kiam iamaj “svisoj” senarbigas teritorion en Peruo. De la 16a ĝis la 19a jc menonitaj familioj migris de Svislando al Ameriko. Tre konservemaj, vojaĝemaj kaj naskantaj meze po 8 infanojn en ĉiu familio ili instaligis en pluraj lokoj de tuta Ameriko, pluparolante la alemanan dialekton de Berno.

En perua regiono, kie menonitoj instaligis, trankvile vivas prapopolo nomata ŝipiboj, kiu posedas dulingvan lernejon. Sed la nova alveno de menonitoj kreas problemon, ĉar ŝajne oni vendis al ili teritorion, kiu apartenas al indianoj ŝipiboj el la komunumo *Nuevo Ceilan*, kies rajto je tiuj teroj estis konfirmita en 1993. Sekve la regiona Estraro pri Agrikulturo de *Ucayali* (Peruo) estas alvokata konfirmi, ĉu jes aŭ ne tiu teritorio apartenas al la indianoj. Ankaŭ vi povas vin turni al tiu instanco por peti, ke ili konfirmu, esperante, ke se la mondo mobiliziĝas por helpi la indianan komunumon, la instancoj reagos kaj ni kune savos kaj la teron de la indianoj kaj la praarbaron.

El: <https://www.youtube.com/watch?v=eUG8WNiauK0>

Interesatoj kontaktu: triolle.renee@wanadoo.fr



INFORMILO 80

Internacia
komitato
por
Etnaj
Liberecoj,

Honora prezidanto: *Uwe Joachim Moritz*

Karaj IKEL membroj, karaj legantoj, trifoje vi povos renkonti IKEL dum la ĉisomera UK en Lisbono:

- **Movada foiro**, sabate la 28an de julio, inter la 19a kaj 21a horoj antaŭ la Fakultato pri Juro.
- **Ĝenerala kunveno de la membroj**, kiu laŭstatute devas okazi ĉiun duan jaron. Tiu ĉi anonco valoras kiel oficiala kunvokilo.
- **Prelego «1968-2018: 50-jariĝo de la starigo de la Unuigita Eŭska»** fare de *Rafael Blanco* el Nafaro. La lokon, tagon kaj horon de la du lastaj eventoj ni ekscios nur ricevinte la kongresan libron en Lisbono. IKELanoj kaj aliaj interesitoj pri etnismaj demandoj klopodu partopreni!

AF